



N-ro 34 2011/03/29

Sekvu la vizitagendon de Petra

La vizito de la hungara lingvoinstruistino Petra Smidéliusz al la asocio, la 26an de marto, estis tre fruktodona. Matene ŝi prezentis prelegeton pri Hungario por deko da lernantoj. La prelegeto tamen fariĝis duhora parolado kiu kaptis la atenton de la lernantoj de la komenco ĝis la fino.

Same okazis al la posttagmeza klaso: ĉirkaŭ dudeko da lernantoj akompanis kun scivolo kaj atento la fluan kaj agrablan paroladon de la vizitantino. La komencintoj bone akompanis la duhoran paroladon. Ne tiel glate sukcesis sekvi la dumonataj komencantoj, kiuj bezonis iom da traduko-helpo fare de la kursgvidantino Maria Cecília.

Je la 16a horo, pli ol 40 vizitantoj de la kultura kunveno komencis plenigi la prelegejon atende al la apero de Petra kiu eĉ ne havis tempon iomete ripozi de la antaŭa prelego. Baldaŭ ŝia laco aliĝis al vigla parolado kiu agrable komuniĝis al la tuta ĉeestantaro, kiu multe demandis.

Resume, ŝi faris tri prelegojn - unu matene kaj du posttagmeze. Entute ŝi parolis dum ĉirkaŭ ses horojn! Pro la varmo, ŝvitgutoj briletis sur la fruntoj de la ĉeestantoj, kiuj volonte suprenirus al la teretaĝa parto de la sidejo por ĝui iom da pli freŝa aero, sed pli forta brilo de kontento kaj admiro tremetis en iliaj okuloj restigante ilin sur la seĝo.

La sekvan matenon Petra veturis al la marborda urbo São Vicente, kie nun ŝi agadas diskonige kaj varbcele. Ĵaŭdon (la 31an de marto) ŝi prelegos ĉe UNIFESP, en Guarulhos/SP, kaj vendredon (la 1an de aprilo) ĉe CPN-São Mateus, en la ĉefurbo Sanpaŭlo. Sabaton (la 2an de aprilo) ŝi revenos al la sidejo de EASP por gvidi du lecionojn, laŭ retkta metodo: unu matene, de la 10h ĝis 12h, kaj alian posttagmeze, de la 14h ĝis la 16h. La sekvan tagon (dimanĉe), ŝi veturos al la urbo São Carlos, kie ŝi agados dum tri tagoj

kun ebleco viziti la apudurbon Bauru. Revene al Sanpaŭlo, merkredon, ŝi reveturos, ĵaŭdon (la 7an de aprilo) al la urboj Pouso Alegre kaj Silvianópolis, en la ŝtato Minas Gerais, kiel ŝi pasigos tri tagojn. Revene sabaton (la 9an de aprilo), ŝi gvidos la duan lecionon, laŭ rekta metodo, en la sidejo de EASP posttagmeze, de la 14h ĝis la 16h. La sekvan lundon matene (la 11an de aprilo) ŝi ekiros el Sanpaŭlo, al kie ŝi revenos julie cele partopreni en la 8a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto.

Se vi loĝas proksime al unu el tiuj prelego-lokoj, kaj deziras ĉeesti ŝian prezenton, kontaktu nin por pliaj informoj <contato[heliko]easp.org.br> aŭ la lokajn gastigantojn: Santos - Emilio Cid <cid.emilio[heliko]gmail.com>; São Vicente - Paulo Roberto <kretcheu[heliko]gmail.com>; São Carlos - Gilberto Menegasso <menegasso.gilberto[heliko]gmail.com>; Bauru - Mauro Progiante <jmprogiante[heliko]yahoo.com.br>; Pouso Alegre/Silvianópolis - Maria Antônia <antoniasobral[heliko]yahoo.com.br>; UNIFESP Guarulhos - Osmar S. Alves <osmar.silvaalves[heliko]gmail.com>; kaj CPN-São Mateus - Odamir Feitosa <odamir.esperanto[heliko]gmail.com>.

Vi povas sekvi tiun aventuron ankaŭ per vizito al ŝia blogo: <http://petrasurvoje.blogspot.com/>